

HERMIASO

**SATIRO PRI
LA PROFANAJ FILOZOFOJ**

el la helena tradukis
GERRIT BERVELING

Satiro pri la profanaj filozofoj

Elhelenigis
Gerrit Berveling

Origine eldonita ĉe *Simpozio 17* (p. 25-30).

Satiro pri la profanaj filozofoj

Enkonduko

Hermiaso la filozofo estas homo pri kiu oni nur scias, ke li vivis, ĉar ekzistas libro kun lia nomo. Pro la interna aspekto de la prezentado kaj lingvo, ŝajne li vivis inter la fino de la 2-a jarcento kaj la komenco de la 4-a. Tiu verko estas *Satiroj pri la profanaj filozofoj* (*Διασυρμὸς τῶν ἔξω φιλοσόφων* [*Diasyrmós tōn ékso filósōfon*] P. G., 5, 1207-1232). La prezentado havas karakteron de kristana apologio, kiu supraĵe ridindigas la malnovajn filozofojn. Celante ridindigi, li prefere pritraktas tiujn doktrinojn pri kiuj pli facile fariĝas la spritaĵoj. Pro tio, tiu kristana verko ne havas ordinare signifon. Ĝi restas tamen kurioza kaj kapabla montri, ke en kelkaj rondoj la filozofio de la malnovaj ne ricevis la merititan prestiĝon.

Satiro pri la profanaj filozofoj

Traduko¹

I. 1 Paŭlo, la sankta apostolo, skribante al la Korintanoj loĝantaj en la Lakonika regiono de Grekujo,² diras: Ho plej amataj, la saĝo de tiu ĉi mondo estas stulteco antaŭ Dio, kaj ne maltrafe tion li diris; ĉar mi kredas, ke originas ĝi el la apostatiĝo de la anĝeloj. Tial la Filozofoj prezentas siajn instruojn ne unuece kaj interkonsentante inter si. **2** Kelkaj el ili ja diras, ke la animo estas fajro; aliaj, ke aero (la Stoikuloj); aliaj, ke intelekto; aliaj, ke moviĝo (Heraklito); aliaj, ke spirado; aliaj, ke forto kiu emanis el la astroj; aliaj, ke movanta nombro (Pitagoro); aliaj, ke fekundiga akvo (Hipono); aliaj, ke elemento konsistanta el elementoj; aliaj, ke harmonio (Dinarĥo); aliaj, ke sango (Kritiaso); aliaj, ke spirito; aliaj, ke la unuo (Pitagoro); kaj [...] la malnovaj la kontraŭon. Kiom da diskursoj pri la temo, kiom da disputoj, kiom da aferoj de sofistoj kiuj pli volonte kverelas ol serĉas la veron!

II. 3 Sed estu do tiel; pri la naturo de l' animo ili malkonsentas, sed pri ĉio cetera koncerne la animon ili ja konkordas! Sed ĝian bonfarcon kelkaj ja nomas bono, aliaj malbono; aliaj: io meze inter bono kaj malbono; koncerne ĝian naturon, kelkaj asertas ĝin senmorta, aliaj mortideva; aliaj, ke ĝi daŭras mallonge; aliaj, ke ĝi transiras al besto; aliaj, ke ĝi dissolviĝas en atomojn; aliaj, ke ĝi trifoje reenkarniĝos; aliaj atribuas al ĝi periodojn de tri mil jaroj. Ja kiuj eĉ ne vivas cent jarojn, tiuj povas promesi tri mil jarojn estonte! **4** Tion do kiel ni nomu? Laŭ mi ĉarlatanaĵoj aŭ sencio aŭ frenezo aŭ malpaco aŭ ĉio ĉi samtempe. Se vere

1 Teksto el la 2a aŭ 3a jarcento post Kristo; kelkaj eĉ volas meti ĝin ĝis en la 6an jarcenton, sed kun malmulte da verŝajno. Temas pri iom simplisma "pruvado" ke la pagana (= helena) filozofio ne taŭgas pro ĝia neunueco. La ne nomita sed ja intencita intenco, kompreneble, estas akceptigi, ke "do" sole senchavas la kristana filozofio.

2 Lakoniko: regiono ĉirkaŭ Sparto.

ili trovis la veron, ili konsentu aŭ akordiĝu kaj kun plezuro mi kredos ilin; sed se ili tiras min je la animo kaj ĉiu kuntrenas ĝin al alia naturo, ĉiu al alia substanco, ĉiu ŝanĝas ĝin je alian materion, tiam mi konfesas ke mi indigniĝas pro ĉi ŝanĝiĝemo de la aferoj. Nun mi estas senmorta kaj ĝojas, nun denove mi iĝas mortideva kaj ploras; ĵus mi dissolviĝas en atomojn, fariĝas akvo, iĝas aero, iĝas fajro. Poste mi jam ne estas plu aero nek fajro, oni faras min besto, faras min fiŝo; ree pli poste mi havas delfenojn kiel fratojn. Kaj kiam mi rigardas min mem, mi ektimas pro mia korpo kaj mi ne scias kiel nomi ĝin: homo aŭ hundo aŭ lupo aŭ taŭro aŭ birdo aŭ ŝafo aŭ drako aŭ ĥimero. Ĉar la filozofoj ŝanĝas min en ĉiuspecajn bestojn: surterajn, enakvajn, multformajn, sovaĝajn, malsovaĝajn, mutajn, belsonajn, neraciajn kaj raciajn. Mi naĝas, mi flugas, mi serpentumas, mi kuras, mi sidiĝas. Kaj Empedoklo faras el mi ankoraŭ arbustaĵon.

III. 5 Ĉar la Filozofoj do ne sukcesis interkonsente eltrovi la naturon de la homa animo, ili ankoraŭ multe malpli povus diri la veron pri la Dioj aŭ pri la mondo. Ĉar tian trokuraĝon ili ja havas, se ne nomi ĝin frenezo. Ĉar kiuj ne kapablis trovi sian propran animon, serĉas do la naturon de la Dioj; kaj kiuj ne konas sian propran korpon, pridiskutas la konsiston de la mondo. **6** Komprenoble pri la principoj de la naturo ili malkonsentas. Kiam Anaksagoro min instruas, li donas jenan lecionon: La bazo de ĉio estas la *νοῦς*³ kaj tio estas la instiganto kaj la mastro de ĉio kaj metas ordon en la senordo kaj donas movon al la senmova kaj distingas inter la miksaĵo kaj faras belon en la ĥaoso. Tion dirante, Anaksagoro estas mia amiko kaj mi kredas lian instruon. Sed oponas kontraŭ li Meliso kaj Parmenido. Parmenido eĉ en poemego heroldas, ke la esenco estas unu, kaj eterna, kaj senmova, k.t.p. Do mi kliniĝas denove al tiu ĉi opinio, nesciante kiamaniere. **7** Parmenido forpuŝis el mia menso Anaksagoron. Sed kiam mi do supozas, ke jen mi posedas senskuan konvinkon, Anaksimeno sin intermetas kriante: Sed mi diras al vi: La tuto estas aero, kaj tio, densiĝante kaj kunpremiĝante, fariĝas akvo kaj tero, sed maldensiĝante kaj disŝutiĝante ĝi iĝas etero kaj fajro, kaj refoje returniĝante en sian naturon ĝi iĝas aero [...] Kaj ankaŭ al li mi akordiĝas denove kaj mi ekamas Anaksimemon.

IV. 8 Sed tuj jen Empedoklo, spirblovante kaj tutpulme kriante elde sia Etno:⁴ La bazaj principoj de ĉio estas malamo kaj amo, unu kunigante, la alia disigante; kaj ilia interluktado faras ĉion. Mi difinas ĉion kiel similan kaj malsimilan, senfinan kaj fin-havan, eternan kaj estiĝintan.

— Bonege, Empedoklo! Mi akompanos vin eĉ ĝis en vian fajran krateron!

9 Sed aliflanke ekstaras Protagoro, li kuntiras min, dirante: La mezurilo, la kriterio de l' aferoj estas la homo, kaj tio kio submetiĝas al la sensoj estas aĵoj, kaj kio al ili ne submetiĝas, ne apartenas al la formoj de l' estado. Flatite de tiaj diroj, mi ĝuas Protagoron, ĉar ĉio aŭ certe la plimulto dependas de la homo. **10** Sed de alia flanko Taleso promesas al mi la veron, difinante la akvon kiel principon de l' universo. Kaj el la humida sin formas

3 *Nous*: intelekto.

4 Empedoklo mortis per salto en la krateron de Etno.

ĉio kaj en la humidan denove dissolviĝas, kaj la tero flosas super la akvo. Kial mi ne kredu al Taleso, la plej olda de l' Ioniaj filozofoj? Sed lia samurbano Anaksimandro asertas ke la eterna moviĝo estas pli praa principo ol la akvo, kaj ke el ĝi kelkaj aĵoj estiĝas, aliaj pereas. Kompreneble nun do fidindu Anaksimandro.

V. 11 Sed ĉu ne ankaŭ famas Arĥelao, kiu demonstras, ke la principoj de ĉio estas varmo kaj frido? Sed aliflanke ne konsentas al li la grandbuŝa Platono, kiu diras ke la principoj estas Dio, la materio kaj la modelo. Nun mi do estas konvinkita! Ĉar, kiel mi ne kredu la filozofon, kiu mem inventis la ĉaron de Zeŭso?⁵ Malantaŭ li stariĝis lia lerninto Aristotelo, kiu ĵaluzas la majstron pro la ĉarofarado. Li difinas aliajn principojn: la faradon kaj la toleradon. La aktiva principo, la etero, estas sen-sufera; la pasiva havas kvar kvalitojn: sekecon, humidecon, varmon kaj fridon. Kaj efektive, per la transformiĝo de ĉi tiuj ĉio fariĝas kaj neniĝas. **12** Mi vere laciĝas, ke ĉiam mi devas ascendi kaj descendi kun tiuj opinioj. Tial do mi restos ĉe la opinio de Aristotelo kaj neniu instruo min plu ĝenu!

VI. Sed kion mi spertas do? Ĉar ja tiras la fadenojn de mia animo kelkaj olduloj multe pli aĝaj! Ferekido ja diras, ke la principoj estas Zeŭso, Ĥtonia kaj Kronoso. Zeŭso estas la etero, Ĥtonia la tero, Kronoso la tempo. La etero estas la aktiva, la tero la pasiva, kaj la tempo estas tio, en kio ĉio fariĝas. Estas ĵaluzo inter la olduloj. Leŭkipo, kiu opinias ĉion ĉi frenezaĵo, kredas ke la principoj estas la nelimigita, la ĉiammoviĝa kaj la infinitezima. Kaj ke la korpoj malplej pezaj, kiuj supreniĝas, fariĝas fajro kaj aero; sed la pli densaj, kiuj sube fiksiĝas, fariĝas akvo kaj tero. **13** Kiel longe mi ankoraŭ lernos tiajn aferojn sen lerni la veron? Krom ke Demokrito liberigus min el la erarvagado per la demonstrado, ke la principoj estas esto kaj ne-esto; kaj ke la esto estas plena, la ne-esto malplena. La pleno, dank' al sia pozicio kaj siaj rilatoj estigas ĉion en la malpleno. Eble mi kredus la bonan Demokriton kaj volonte mi ridus kune kun li, se ne rekonvinkus min Heraklito, kiu laŭte ekkrias: Principo de ĉio estas la fajro, kaj ĝiaj formoj estas du: rareco kaj denseco; la unu estas aktiva, la alia pasiva; la unu kunigas, la alia distingas. Al mi ja sufiĉas nun: mi ne plu drinkos el tiuj principoj.

14 Sed eĉ tiam avertas min Epikuro, ke mi ne malŝatu lian belan instruon pri la atomoj kaj la malpleno. Ĉar dank' al ties multobla kaj bunta interplektiĝo ĉio estiĝas kaj neniĝas.

VII. Mi ne kontraŭdiras al vi, Epikuro, plej inda homo! Sed Kleanto levas sian kapon de l' akvoputo,⁶ kaj ridas pri via doktrino kaj li mem suprentiras elpute la verajn principojn: Dion kaj materion. La tero transformiĝas en akvon, la akvo en aeron, la aero leviĝas, la fajro iras al la ĉirkaŭteraj regionoj, la animo penetras tra la tutan universon kaj ĉar ni partoprenas en ĝi, ni estas anim-havaj.

15 Nu, dum ĉio ĉi statas ĉi tiel, superinundas min nova amaso el Libio, Karneado, Klitomaĥo kaj ĉiuj iliaj sekvantoj, kiuj distretas ĉiujn instruojn de la ceteraj kaj emfaze

⁵ Ĉaro de Zeŭso: vidu en Platono — Fedro 246, E.

⁶ Akvoputo: Kleanto, estro de l' Stoiko post Zenono, estis laŭdire tiel malriĉa, ke post dumtaga okupiĝo pri filozofio, dumnokte li devis okupiĝi pri akvoĉerpado por akvumi sian ĝardenon.

asertadas, ke ĉio estas nekomprenebla kaj ke, ligite al la vero, ĉiam sin prezentas trompa fantazio. Kion nun mi spertu post tiom da penadoj? Kiamaniere mi povos elverŝi el mia menso tiujn doktrinojn? Ĉar se nenio estas komprenebla, do for kun la vero inter la homoj! Kaj la tiom himnata filozofio do pli luktas kun ombroj ol ke ĝi posedus komprenon pri la realo.

VIII. 16 Kelkaj aliaj de la olda tribo, Pitagoro kaj liaj samtribanoj, estimindaj kaj silentemaj homoj, liveras al mi aliajn instruojn, kvazaŭ misterojn, kaj inter-alie tiun grandan kaj sekretan: “Li mem ĝin diris.” La principo de ĉio estas la unuo, kaj el ĝiaj figuroj kaj nombroj naskiĝas la elementoj. Nu, la nombron, la figuron kaj la mezuron de ĉiu el ili oni pli malpli jene klarigas: la fajro rezultas el dudek kvar rektangulaj trianguloj, ĉirkaŭite de kvar egallateraj trianguloj. Kaj ĉiu el la egallateraj trianguloj konsistas el ses rektangulaj trianguloj, kaj tial oni komparas ĝin al piramido. La aero rezultas el kvardek ok trianguloj, ĉirkaŭite de ok egallateraj trianguloj; tio similas al oktaedro, kiu ĉirkaŭiĝas de ok egallateraj trianguloj, el kiuj ĉiu konsistas el ses rektangulaj trianguloj, tiel ke la totalo estas kvardek ok. La akvo rezultas el cent dudek trianguloj, ĉirkaŭite de dudek egalaj kaj egallateraj trianguloj, kaj ĝi similas al ikosaedro, kiu konsistas el cent dudek egalaj kaj egallateraj trianguloj. La etero rezultas el dek du egallateraj pentagonoj, kaj ĝi similas al dodekaedro. La tero rezultas el kvardek ok trianguloj, ĉirkaŭite de ses egallateraj kvadratoj. Ĝi similas kubon. Ĉar la kubo estas ĉirkaŭita de ses kvadratoj, el kiuj ĉiu konsistas el ok trianguloj, tiel ke la totalo fariĝas kvardek ok.

IX. 17 Pitagoro mezuras la mondon. Kaj denove Di-posedate mi malŝatas miajn domon, patrujon, edzinon kaj infanojn kaj tute neniom plu zorgas pri ili. Sed mi leviĝas al la etero mem kaj, ricevinte de Pitagoro la mezurilon, mi komencis mezuri la fajron. Ĉar por mezuri ĝin Zeŭso ne sufiĉis; ĉar se la granda vivaĵo, la granda korpo, la granda animo, kiu estas mi, ne mem ascendus al la ĉielo por mezuri la eteron, do for estus la regado de Zeŭso! Kaj kiam mi mezuris ĝin kaj Zeŭso do informiĝis de mi, kiom da anguloj havas la fajro, mi denove descendas el la ĉielo, kaj manĝinte olivojn, figojn kaj legomojn, mi kiel eble plej rekte direktiĝas al la akvo kaj mi mezuras laŭ kubuto, fingro kaj duonkubuto la humidan substancon kaj ĝian profundon mi determinas, por ke ankaŭ Pozidonon mi instruu, pri kiom da marsurfaco li regas. La tutan teron mi trakuras en unu tago, kalkulante ĝiajn nombrojn, mezurojn kaj figurojn. Ĉar mi ja estas konvinkita, ke — estante kiu mi estas kaj en mia aĝo — eĉ unu decimetron mi ne devas preterlasi en la tuta universo. Mi scias la nombron de la steloj kaj de la fiŝoj kaj de la bestoj kaj, metante la kosmon en balancilon, mi povas sufiĉe precize scii ĝian pezon. **18** Ĝis nun mia animo strebadis pri tiaj aferoj, por estradi la tuton.

X. Sed kliniĝante al mi Epikuro diras: Vi do unu mondon mezuris, ho amiko, sed ekzistas multaj kaj sennombraj mondoj. Denove mi do estas devigata mezuri aliajn ĉielojn, aliajn eterojn, — kaj eĉ en ega nombro! Ek do, sen tempoperdo, provizinte min per furaĝo por pluraj tagoj, mi foriras al la mondoj de Epikuro. La limojn de l' mondo, Tetisan kaj Oceanon, mi senprobleme transflugas. Enirinte en novan mondon, kvazaŭ en novan

urbon, mi mezuras ĝin komplete en kelkaj tagoj. Kaj ankaŭ de tie mi pluiras al tria mondo, poste al kvara kaj kvina kaj deka kaj centa kaj mila — kaj ĝis kiu limo...? Ĉar jen ombro de scienco, nigra trompo, senlima erarado, senfina fantazio kaj senkomprena stulteco atakas min. Aliflanke, kial mi hezitus mezuri la atomojn mem, el kiuj estiĝis tiom da mondoj? Mi lasu nenion senkontrola, precipe ne en aferoj tiel necesaj kaj utilaj, de kiuj dependas la feliĉo de la familio kaj de la ŝtato!?

19 Tion ĉi mi do eksplikis kun la intenco montri la kontraŭdirojn en iliaj instruoj kaj kiel la pristudado de la aĵoj kondukas ilin ĝis en la senlimon kaj nedifineblon, kaj la objekto de tio ĉi estas nekonebla kaj senutila, ĉar ĝi ne baziĝas je klara fakto aŭ racia rezonado.

Enkomputiligita de Efthimios Mavrogeorgiadis kaj
korektita de la tradukinto en novembro 2005.

Distribuata pere de www.esperanto.gr.